

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, kiu anstataŭas la bedaŭrinde malsanan profesoron Charles Ecabert. Ni parolos hodiaŭ pri la problemo de la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

En 1962 ne plu eblas enketi pri la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj sen renkonti la fakton esperanto. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ni diru ĝis 1950, oni ankoraŭ povis neglekti ĝin. Sed ĉar la instruado de nia lingvo multe disvastiĝis dum la dek lastaj jaroj, kaj ĉar samtempe la lingvo-problemo en la mondo multe akriĝis, nescio pri la fakto esperanto fariĝis ignoro.

La kongreso de F.I.A.I., kiu okazis tiun someron en Stokholmo nin interesos tiurilate. Sed unue necesas diri kelkajn vortojn pri tiu movado. Kio estas F.I.A.I. ? Estas la movado, kiu grupigas la naciajn instruistajn asociojn de la tuta mondo. La literoj F.I.A.I. devenas de la franca nomo de tiu movado : *Fédération internationale des associations d'instituteurs*. En esperanto ni povas diri : Internacia Federacio de Instruistaj Asocioj.

Kun Unesko tiu F.I.A.I. plenumas gravan taskon en la hodiaŭa edukistara mondo. Ĝi permesas al la instruistoj el la tuta mondo pridiskuti la ĉefajn problemojn de la nuntempa pedagogio. Per siaj rezolucioj tiu F.I.A.I. influas la decidojn de la naciaj instruistaj asocioj, kiuj poste influas la lernej-instancojn en la diversaj landoj. Kiel Unesko, F.I.A.I. ne povas decidi program-ŝanĝojn. Ĝi tamen povas proponi bonajn solvojn disvastigendajn aŭ kritiki maltaŭgajn. Per raportoj, kiuj aperas en la naciaj bultenoj de la membraj asocioj, F.I.A.I. diskonigas sian laboron kaj instigas la instruistojn al ekago sur ofte neantaŭviditajn terenojn.

La delegitara kongreso de F.I.A.I., kiu okazis tiun ĉi someron en Stokholmo, pritraktis temon, kiu estas al ni tre kara : tio estas la problemo de la instruado de fremdaj lingvoj en la unuagradaj lernejoj (la devigaj popolaj lernejoj).

Dum la kunsidoj plurfoje naciaj delegitoj menciis la avantaĝojn aŭ la malfacilaĵojn de la instruado de esperanto en la lernejoj. Tiu delegitaro sin ne prononcis rilate la instruadon de la internacia lingvo en la lernejoj, sed komisiis sian plenum-estraron entrepreni enketon tiurilate. Kaj dum tiu ĉi monato la estraro de F.I.A.I. enketas ĉe ĉiuj siaj membraj asocioj por ricevi ekzaktajn informojn koncerne la instruadon de esperanto en la lernejoj kaj la laboron de la esperantistaj edukistoj.

Laŭ la respondoj ricevotaj la estraro redaktos raporton, kiun la venonta delegitara kongreso povos akcepti. Estos do interese atente sekvi la laboron de F.I.A.I. rilate tiun aferon.

Apud nia lingvo rimedoj plej diversaj estas proponataj por solvi la nunan babelismon. Ni ekzameni tiujn proponojn :

Lingvaj profesoroj proponas, ke oni disvastigu la uzon de unu nacia lingvo. Plej ofte ili proponas la anglan, kiu jam estas la komerca plej uzata lingvo. Ili pensas, ke se oni instruas tiun lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo, post kelkaj jardekoj la lingvo-kaoso sur la internacia tereno solviĝos de si mem. Sed, kiel diras iliaj kontraŭuloj, ĝis hodiaŭ nur la plej lertaj gelernantoj ricevis tiun instruon. En la popolaj lernejoj plej ofte oni ne instruas fremdan lingvon. Se inter la gelernantoj de la angla lingvo jam nun nur malmultaj atingas lingvo-scion, kiu permesas aktivan uzon de la lingvo, la rezulto ne estos pli bona ĉe gelernantoj de la popolaj devigaj lernejoj. Al tiu kritiko la profesoroj respondas, ke oni ne uzis ĝis hodiaŭ teknikajn rimedojn. Ili proponas, ke oni instruu la lingvon per la televido sub severa kontrolo de la klasa instruisto. Per permesi al la gelernantoj trapasi de la pasiva al la aktiva kono de la lingvo ili proponas lernejinterŝanĝojn.

Al la kontraŭuloj, kiuj asertas, ke tiuj lernejinterŝanĝoj kaŭzus al la instru-instancoj tro altajn elspezojn, la lingvo-profesoroj prave respondas, ke por la milito la ŝtatoj elspezas multe

pli altajn sumojn. Por paca celo la samaj registaroj certe akceptos elspezi iom da mono, se per internacia kontrakto ĉiuj registaroj de la mondo estas devigataj fari la samon.

Tiu propono estas tre interesa kaj konstruiga. Sed ekzistas ombro : la landoj, kiuj kulture ne estas sub la influo de la angla civilizo, ne povas toleri la trudon de tiu lingvo. Tial la delegitoj de tiuj landoj proponas plej diversajn lingvojn por la interŝtata kontrakto : la francan, la hispanan, la rusan, la ĉinan, ktp... Sed samtempe ĉiuj komprenas, ke neniu konsento por unu el tiuj lingvoj okazos. La intelektuloj malkovras hodiaŭ tion, kion la esperantistoj jam de longe komprenis : ke nacia lingvo neniam povos fariĝi internacia interlingvo. Ĝia disvastiĝo kulture tro endanĝerigus la ekziston de la aliaj lingvoj.

Aliaj lingvaj profesoroj proponas, ke oni elektu la latinan, kiel interlingvon. Kiam ili faras tiun proponon, ili ne serioze pensas al la instruado de la latina en la unuagrada lernejoj. Ili ĉefe pensas al la gimnazia instruado, do al la duagrada instruado, kiu tuŝas nur la plej lertajn gelernantojn. La kontraŭoj rimarkigas, ke eĉ post longjara studo la gelernantoj ne estras la lingvon sufiĉe por ĝin povi paroli. Tiam la profesoroj respondas, ke certe per pli taŭgaj metodoj oni povus atingi pli bonajn rezultojn. Ĉu ili kredas siajn dirojn ? Mi ne pensas. Pro diversaj kaŭzoj, tiuj klasikemuloj alkroĉiĝas al sia propono sen kredi al ĝia sukceso. Ili timas, ke la praktiko de interlingvo mortfrapu la klasikan humanismon. Ili do provas plej longe malebligi la solviĝon de la problemo de la fremdlingva instruado en la unuagrada lernejoj.

En venonta prelego ni ekzamenos aliajn proponojn por solvi la nunan babelismon. Ni konkludu hodiaŭ dirante, ke ambaŭ proponoj ĵus priskribitaj estas interesaj. La angla montris sin taŭga interlingvo por la internacia komerco. La klasikemuloj pravas, kiam ili defendas la klasikajn kulturojn.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando pri la problemo de la instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

-oOo-